

Rose Ausländer,

## Repaciĝo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ree mateno  
sen fantomoj  
En la roso briletas la ĉielarko  
kiel signo de l' repaciĝo.

Vi rajtas ĝoji  
pri la perfekta konstruo de l' rozo  
Vi rajtas en la verda labirinto  
perdiĝi kaj troviĝi  
en klara formo.

Vi ratas esti homo  
fidoplena

La mateno roso rakontas al vi  
fabelojn. Vi rajtas  
nove ordigi la aĵojn  
koloron disdoni  
kaj ree  
beldiri

En tiu ĉi mateno  
vi kreanto kaj kreito

*Traduko de la Germana poemo "Versöhnung" de ROSE AUSLÄNDER (civila nomo: Rosalie Beatrice Scherzer, \*1901-05-11 – †1988-01-03) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2014-03-18.*

*Arg-980-1978 (2014-03-18 15:54:39)*